

Francilia federacio

KomitatKunsido 04/06/21 je la 7a ptm, rete

Partopreno

- Michèle Abada-Simon (MAS)
- Pierre Gauthier (PG), vickasisto ĉeestas
- Marc Giraud (MG), prezidanto ĉeestas
- Didier Janot (DJ) ĉeestas
- Aurélien Lestage (AL) ĉeestas
- François Lo Jacomo (FLJ) sin ekskuzis
- Didier Loison (DL), kasisto
- Marielle Martin (MM) ĉeestas
- Laure Patas d'Illiers (LPI), sekretario ĉeestas
- Guillaume Vera-Navas (GVN) ĉeestas
- Frantz Vichot (FV) ĉeestas

Ekde la antaŭa KK

La protokolo de la Ĝenerala Asembleo de la 20/03/21 estis enretigita al

<https://esperanto.paris/membro-kunvenoj>

La protokolo de la KK de la 20/03/21 estis aprobita kaj enretigita al

<https://esperanto.paris/komitat-kunsidoj>

Salono pri matematiko

Ĝi okazis rete, de la 27a al la 30a de majo. Nia budo malfermiĝis ĉiutage de la 3a ĝis la 5a ptm. Organizis FLJ, partoprenis aŭ helpis AL, LPI, PG, Régis kaj Melono. Neniu vizitis ĵaŭde kaj vendrede. Sabate venis esperantistoj, kun kiuj ni babilis. Dimanĉe venis kelkaj, du eĉ restis longe post la prelego de FLJ. En la retejo de la evento pluatingeblas nia reta budo, kun videaĵoj <https://salon-math.fr/2021/05/14/esperanto/>

Venontjare, ni bezonos prepariĝi sufiĉe antaŭe kaj sufiĉe zorge, ĉefe se la salono denove okazas rete, ĉar la organizantoj de la salono ŝajnas ne kapablaj allogi la publikon kaze de reta evento. Restas pluraj monatoj por organizi la preparon de la evento mem kaj ankaŭ de la komunikado. Kompreneble necesos fakaj kunvenoj pri tio kaj respondeculo(j) por prizorgi tion.

Bilanckunsido pri ĝemelaj urboj

Ĝi okazis rete la 1an de junio. Raportis la organizanto, MG, pri la monata babilrondoj, la legoklubo kaj la koresponda servo. La bilanco estas pozitiva. Ekde septembro 2021, en ĝemelaj urboj babilrondoj ni organizos retajn turneojn, ĉiu monate kun alilanda urbo. Legoklubo 2a okazos en junio pri la tekstoj de LPI, la 3a pri "Solaris" de Stanislas Lem kiam ĝia traduko publikiĝos, probable fine de 2021. La koresponda servo estos repripensita en septembro.

Kursoj

Plu okazas la 3 kursoj:

1a nivelo kun MAS

2a nivelo kun MG (reta, kun 7 francoj kaj 3 italoj, ĝis fino de junio)

3a nivelo kun FLJ (reta, kun 3 francilianoj)

En nia retejo oni povas anonci ke venontjare okazos kursoj, sen precizigi pli. MG instruos rete, li scios la daton nur fine de junio. AL demandos al FLJ kaj MAS.

Koruso

Nenion planebla nun pro pandemio. Informoj kaj decidoj en Septembro

Esperanto-kafejo-pikniko

Estas denove permesite pikniki. GVN, kiu respondecas pri tiu agado, mesaĝis ke li povas organizi piknikojn. Kutime ili okazas ĉiumonate, la dua sabato vespere, do la venonta okazos la 10an de julio.

Projektoj

Plej multe de niaj projektoj ne pluevoluas pro la sana krizo. Ĉu tamen okazis io ekde la 20/03 pri la jenaj kelkaj projektoj?

- Ekspozicio pri Péraire: GVN antaŭvidas fini sian laboron dum la venontaj semajnoj, lastatempe multaj homoj parolas pri Péraire. Pascal Dubourg-Glatigny, esploristo de CNRS, venos en la Ĉerizejo la 5an de junio.
- Paĝmarkilo: MG ricevis ilin kaj alportos ilin al la Ĉerizejo antaŭ septembro. Ni disdonos la paĝmarkilojn en budoj (kiel la kalendaretoj) kaj en la libroservo (en libro aĉetita).
- Ministerio pri financaj aferoj (ties kultura francilia biblioteko "place des arts"): intervjuo de LPI publikiĝis en la retejo, la prelego de DL kaj LPI restas prokrastata sendate.
- Espéranto Café croissant: GVN organizis 2 sesiojn, kelkaj homoj venis.

Atentu : la tuta listo de projektoj legeblas en la protokolo de la KK de la 29/01/21

<https://esperanto.paris/IMG/pdf/2021-01-29.pdf>

Plibonigo de nia komunikado

LPI devas kopii kaj alglui la mesaĝojn de MG pri venonta evento, en mesaĝo al la dissendolisto de amikaro. La aliaj provos same fari ĉiu en sia komunikilo.

Pri la venonta jaro 2021-2022

Depende de la sana situacio, ĉiuj agadoj kaj projektoj eble denove okazos, tion oni povos decidi nur post la somero. Ĉi-sube kelkaj rimarkoj dum la kunsido:

- Forumo de asocioj, ĝenerale la 1a sabato de septembro: se ĝi okazas ni partoprenos. Ofte DL prizorgas la budon, ĉu denove? AL pretas helpi.
- Homarfesto, en septembro: la decido partopreni estos farita de Esperanto France, MG havos informojn en la ĝusta momento, li disendos ĝin. Ni tiam decidus pri la preparo kaj deĵorado.
- Malfermitaj pordoj: ni planas organizi tion la 25an de septembro.
- LudTempo: AL pripensas kaj kontaktos Julien. Informoj en Septembro.
- Kultura vespero: Regis ne plu deziras zorgi pri la teatraĵo "Amseruroj" sed pretas zorgi pri filmado kun PG de mallongaj videaĵoj.

- Ateliero pri verkado: LPI pretas fari tion se estas interesitaj homoj, kio ne certas. 3 aŭ 4-foje dum la jaro, nepre surloke.
- Ekzamenoj: nun neniu estas planata, FLJ anoncos kiam denove okazos ĉu KER, ĉu FEI ekzameno.

Demandoj ĵus ricevitaj

- peto de voka gvidanto por laŭtlegado: MM telefonos kaj petos pli da informoj pri la bezono
- peto de fotoj de ekspozicio Geluck; Aleks Kadar respondas.

Dankoj

- Dankon al cxiuj por partopreno kaj venontaj Agadoj.
- Dankon al MG por estro.

Venonta kunsido

KK okazas trimestre. La venonta KK okazos la 25an de septembro je 6 ptm, surloke, tuj post la malfermitaj pordoj.

Tiam ni plu organizos la venontan jaron 2021-2022.

FINO DE LA KK